

LA PROGRESO

Bohema organo esperantista Ĉasopis českých esperantistů

Aperas monate. Jara abono K 4.50 (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

Dro. Jindřich Kohn:

AL LA DOKTRINO PRI MEMDESTINO.

Memdestino estas idea dominanto de niaj tagoj. Ĉiuj pensoj rilatas ĉi tiun vorton. Ĉu ni esprimis ĉiujn ĉi-tiujn rilatojn? Tiun ĉi espriman laboron oni devas ankoraŭ fari. Tie ĉi ni volas prezenti kelkajn pruvojn, ke ĝi estas laboro necesa kaj danko. Antaŭ ĉio ni demandu, kia estas la ŝtata ideo de memdestino. La respondo, kiun ni ricevos post ĉi tiu demando montros al ni ion alian, ol ni atendas. Ŝtata memdestino estas sendependo en kondiĉoj kaj kaŭzoj de ĝia deveno. Ĉe ĉiu ŝtato datiĝas la momento de ĝia deveno de la komenco de ĝia memdestino. La samon oni povas ankaŭ diri pri la ŝtataj formoj. Memdestino komencas de la momento, kiam oni forgesas, ke la ŝtato konsistas el partio venkita kaj venkinta.

Saksujo estis venkinta de Prusujo. Sed Bismarck trovis tian formon de germana konstitucio, ke Saksujo povis daŭrigi en sia memdestina spirito eĉ en la cirkonstanco, kiu estis altrudita al ĝi. Tacitus konservis al ni en la senata parolo de Claudius pri naturalizado de malamikoj la oponiojn de la roma politiko, ke estas necese ŝanĝadi monarkiajn rilatojn en rilatoj memdestinaj. Kiam ŝtato ekzistas kaŭze de siaj eksteraj kondiĉoj, ĝi estas nur fondita. Konstituita ĝi estas nur tiam, kiam ĝia grupiĝo daŭras per si mem. Fondo de la ŝtato estas ago fizika. Ŝtata konstituo estas ago spirita, ago memdestina. La samo rilatas eĉ la ŝtatajn formojn. La nuna absolutismo

Dr. Jindřich Kohn:

K NAUCE O SEBEURĈENÍ.

Seburĉeni je myšlénková dominanta našich dnů. Všechny myšlénky vztahují se k tomu slovu. Vyslovili jsme všechny tyto vztahy? Tuto výrazovou práci třeba ještě vykonati. Chceme zde podati několik ukázek o tom, že jest to práce nutná a vděčná. Ptejme se především, jaká jest státní myšlénka seburĉeni. Odpověď, kterou dobudeme z této otázky nám ukáže cosi jiného, než čekáme. Seburĉeni státu jest neodvislost státu od podmínek a příčin jeho vzniku. U každého státu datuje se okamžik jeho vzniku od počátku jeho seburĉeni. Totéž možno říci o státních formách. Seburĉeni počíná od okamžiku, kdy se zapomene, že skládá se stát z vrstvy vítězné a z vrstvy poražené. Sasko bylo poraženo Pruskem. Ale Bismarck vymyslel takovou formu ústavy německé, aby Sasko v duchu seburĉeni mohlo pokračovati i v poměru, ku kterému bylo přinuceno. Tacitus v senátní řeči Claudiově o naturalisaci nepřátel, zachoval nám názory římské politiky o tom, že jest nutno proměňovati mocenské vztahy ve vztahy seburĉeni. Pokud stát trvá na základě vnějších podmínek jest pouze založen. Ustaven jest teprve tenkrát, když se jeho skladba udržuje sama sebou. Založení státu jest akt fysický. Ustavení státu jest akt duševní, akt seburĉeni. To platí také o stát-

estas io alia ol la absolutismo kontraŭ-revolucia kaj antaŭmarta. Simple pro tio, ke ĝi estas konstituita. Kaj konstituita ĝi estas tial, ke ĝi ne daŭras pro kaŭzo de sia deveno, sed nur pro iu celo, al kiu ĝi helpas. De tie ni venos al diferenco inter la efektiva ŝtato, kiu ekzistas nur kaŭze de grupiĝo de kondiĉoj kaj kaŭzoj, kaj ŝtato anima, kiu prezentas grupiĝon de vivkaŭzoj kaj celoj. La unua estas gvidata per potenco kaj perforto, la alia per propra bezono.

La doktrino pri memdestino rajtas esprimi ankaŭ la demokratan, socialisman, juran, dialektikan, nunan boheman ideon pri memdestino, kaj entute ĉiujn ideojn pri memdestino, laŭ eblo komplete.

Demokrata memdestina ideo estas kaŝita en la doktrino, kiun proklamis Montesquien, ke la principo de demokracio estas virto. Ĝus la demokracio ne devas sin fordoni al ĉiu ideo de ebleco. Ĝi devas realigi nur tion, kio estas necesa kaj matura. Se ni sekvus ĉi tiun principon, ni venus al la konvinko, ke Marx intencis per sia historia materialismo instrui demokratan kreantan memlimiĝon. Sed tiu ĉi certeco samtempe liberigas de la historia materialismo. La dialektikan ideon de memdestino donas la certeco, ke la sinsekvo de epokoj ne estas daŭri-

nich formách. Osvícený absolutism je cosi podstatně jiného, než absolutism protireformační a předbřeznový. Prostě proto, že jest ustaven. A ustaven jest proto, poněvadž netrvá z nějaké příčiny, pro kterou vzniknul, nýbrž pro nějaký účel, který naplňuje. Odtud dojdeme k rozdílu mezi státem skutečným, který pouze trvá skupenstvím podmínek a příčin a mezi státem bytostným, který jest skladbou životních účelů a cílů.

Nauce o sebeurčení náleží vysloviti také demokratickou, socialistickou, právní, dialektickou dnešní, českou myšlénku sebeurčení a vůbec všechny myšlénky sebeurčení, pokud možno úplně. Demokratická myšlénka sebeurčení jest skryta v učení, které hlásal Montesquien, že princip demokracie je ctnost. Právě demokracie nesmí se oddati každé představě možnosti. Musí realizovati to, co jest nutno a zralé. Kdybychom šli za tou myšlénkou, dospěli bychom k jistotě, že Marx chtěl svým historickým materialismem učiti demokrat. tvůrčímu sebeobmezování. Tato jistota však zároveň osvobozuje od historického materialismu. Dialektická myšlénka sebeurčení jest dána jistotou, že sled dob není

FELIETONO.



Dr. Stan. Schulhof:

En tempo de universaleco.

Kiam mi antaŭ jaroj ellernis Esperanton, tiam mi ankaŭ samtempe ekvidis, kiel la tuta mondo al mi malfermiĝas, kaj mi povis nur etendi la manojn por kapti kaj tuŝi ĉion, kio havis antaŭe tute abstraktan kaj ne realan aspekton.

Kion oni jam atingis per tiu ĉi sorĉa vergeto, nia Esperanto! Ĉiuj eblaj kaj neblaj universalaj unuigoj, societo kaj organizacioj estis jam fonditaj kaj ĉiuj anoj de nia movado laboris jam vigle por diversaj tuthomaj ideoj, kaj multaj el ili jam okupis gravan postenon kaj oficon en ĉi tiuj diversaj organizaĵoj.

Kiel bedaŭrinda estulo, kompare kun ili, mi tiam estis! Mi estis nek delegito, nek prezidanto, mi estis simple nenio, ĉar mi venis malfrue, kiel mi en la unua momento opiniis.

Sed mi baldaŭ konvinkiĝis, ke por mi certe ankoraŭ sin trovas iu grava loko, kaj senprograste mi komencis traserĉadi niajn sennombrajn gazetojn. Efektive la sortimento de niaj diversaj universalaj federacioj kaj organizaĵoj estis tre riĉa kaj mi ne havis longe emba-

rasojn. Post ne longa serĉado mi povis unu elektii. Jen mi trovis alvokon por »Universala unuigo de antinikotinoj«, en alia gazeto allogis min la prospekto por la »Ligo kontraŭ longaj har- kaj ĉapelpingloj«, mallonge dirite, mi ne longe hezitis kaj baldaŭ elektis unu el ĉi tiuj tutmondaj kaj mondfeliĉigaj movadoj. Mi aliĝis al »Universala ligo de bonkoranoj«. mallongige »Uldebo«.

Kelkajn tagojn post la forsendo de mia aliĝo al la ĝenerala ofico en Bern, mi ricevis maŝine skribitan respondon kaj legitimacion en kiu mi estis nomita »ĝenerala reprezentanto por bohemiaj kaj kaŭkazaj landoj«, kio krom tiu geografia sensecaĵo montris, ke mi havis ĉi tiun fojon grandan feliĉon. Vere! Kiom da homoj povas posedi simile longan titolon?

Kompreneble kun ĉi ofico mi prenis sur min samtempe kelkajn ne malgrandajn zorgojn. Mia unua devo estis varbi membrojn, kaj mi skribis al multaj homoj, speciale al virinoj, pri kiuj mi supozis, ke ili havas bonan koron. Sed aŭ ili ne havis bonan koron, aŭ ili ne volis kun mi rilati — mi ne ricevis respondojn, kaj dum kelkaj monatoj mi ne sukcesis varbi eĉ ne unu membron.

Ĉar tiu ĉi mia malsukceso ofendis mian fieracon, mi decidiĝis al mistifiko de nia ĝenerala ofico. Mi, ĝenerala reprezentanto fari-

g o. Ĉiu epoko estas memstara kreanta tutaĵo. Hieraŭ ŝajnis, ke konfesoj ne povas prezenti kreantan tutaĵon. Hodiaŭ ni ĉi tiun hieraŭan ideon nur malfacile komprenas. Tial el la nuna malamikeco de la nacioj ni ne devas fari barilojn, kiuj malhelpus al morgaŭa neceseco de kunlaboro. Kaj la bohema ideo de memdestino? Estas donita per la sorta eduko, kiu anime preparis la boheman nacion, ke ĝi en historio trovu fizikan eblon, por liberigi sin eĉ tutan mondon el kondiĉoj kaj kaŭzoj de la bohemgermana antitezo per aranĝo de kreantaj kaŭzoj kaj celoj.

p o k r a ĉ o v á n í. Kaŭda doba jest samostatný tvůrčí celek. Včera se zdálo, že konfese různé nemohou býti tvůrčím aktem. Dnes onu včerejší myšlenku již nenasadno chápeme. Proto podle dnešního nepřátelství národů nesmíme budovati hráze, které by překážely zítřejší nutnosti spoluprotvoření. A česká myšlenka sebeurčení? Jest dána výchovou osudu, který duševně připravil český národ, k čemu nabude historii fysickou možnosť, aby osvobodil sebe i svět z podmínek a příčin česko-německého protitlaku skladbou tvůrčích účelů a cílů.

JUDro B—eto:

AMIKOJ DE LA LINGVO INTERNACIA.

Kvarjara milito multe ŝanĝis la mondon, enkatenigis la vivon, metis barojn inter la homojn. Latine oni diras: »Inter arma silent Musae«. Eĉ nia Esperanto eksilentis... Multaj batalantoj por ĝia paca Zamenhofa idealo de unu familio de la nacioj faĝiris vole nevole batalantoj sangverŝantaj... Terura ironio! Ankaŭ mi fariĝis soldato. Dum tiuj ĉi kvar turaj jaroj mi preskaŭ forgesis, ke mi iam estis fervorega Esperantisto. Ho, vi kara tempo de entuziasmo de miaj unuaj kursoj en Chrudim, de l' esperanta vivo

en Pardubice, kie mi unue estis ravita de la unuaj versoj de nia tiea poeto, kien vi forflugis? Via ideala celado por eterna paco kaj kunfratiĝo de la nacioj ne povis harmonii kun la milito plej terura de la ĝisnunaj. Tiu ĉi milito forrabis eĉ nin, pacajn batalantojn. Mi, kiu antaŭ la milito flue parolis Esperanton, preskaŭ forgesis la paroladon kaj kunveninte kun pro. Pitlik en oficira lernejo en Budapeŝto, mi intermiksitis vortojn de la hungara lingvo, kiun mi tiam lernis, en nian esperantan konversacion. Ĝi estis la sola okazo, kiam dum tiu ĉi milito mi parolis esperante.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi revenis el Tirolando Bohemujon kaj vizitinte mian amikon, samideanon Dron Drtina, advo

ĝis subite trompisto, se vi volas eĉ krimulo. Mi imitis kelkaj subskribojn, kaj per ĉi tiuj falsajoj mi anoncis al nia centra ofico, ke mi sukcesis varbi dekdu novajn membrojn. Komprenoble, la kotizaĵoj mi sendis el mia proprapreŝo. Sed mia konscienco ne estis longe trankvila. La penso, ke mi falsis subskribojn min persekutis tage kaj nokte. En miaj turmentoj mi eĉ konsultis mian juristan amikon, kaj eksciinte, ke mi povus ricevi punon de kelkaj monatoj, mi preskaŭ frenezigis. Feliĉe post kelka tempo mi ricevis de nia centra ofico sciigon, ke miaj varbitoj estis akceptitaj, kaj ke oni proponas al la universala kongreso de »Uldebo«, kiu okazos venontan monaton, ke oni honorigu min per dekoracio por meritoj. Ĉi tiu ne atendita laŭdo tute forpelis miajn pensojn je mia krimo kaj mi tute trankviligis, kiam mi ekveturis al nia tutmonda kongreso, kiu okazis dum la universala kongreso de esperantistoj. La ĉefurbo de Svisujo estis tiam jam plena da verdsteluloj. Komprenoble miaj unuaj paŝoj celis al la strato, en kiu troviĝis nia centra ofico. Post longa serĉado mi fine trovis la straton kaj domon, sed en la tuta domo neniu sciis pri la centra aŭ tutmonda kancelario. Tial mi ekpaŝis al la domo, en kiu okazis nia esperanta kongreso kaj kies unu ĉambro estis difinita por nia laborkunveno. Mi ne bezonas honti,

se mi malkaŝos, ke mia koro forte batis en mia brusto. Ĝi vere ne estas bagatelo kunveni kaj konatiĝi kun centoj da homoj same kiel mi pensantaj kaj agantaj. Mi ankaŭ timis, ĉu mi ankoraŭ trovos lokon en la plena ĉambro. Enirinte, mi estis iom surprizita. En la granda ĉambro sidis nur unu, grasa kaj bonulaspekta sinjoro. Mi senhezite al li alproksimiĝis kaj alparolis: »Ĉu vi sinjoro estas uldebano?« — »Tute ne,« respondis al mi la grasulo, »mi estas membro de Universala ligo por modereco«, kaj li apenaŭ spiris pro sia grasa tavolo. »Sed tie ĉi, en numero 6 okazos kunveno de uldebanoj«, oponis mi al la grasulo, — »Ne, de ulipomanoj«, respondis mallonge la homo kaj sidiĝis senĝene, mian ĉeeston tute ne konsiderante.

Post kelkaj minutoj eniris unu hela, juna sinjorino. Laŭ ŝia aspekto mi opiniis, ke ŝi estas bonkoranino kaj tial kurage mi ŝin alparolis: »Pardonu, sinjorino, ĉu vi apartenas al la ligo de bonkoranoj? Vi ja certe posedas bonan koron?«, mi aldonis ĝentile. — »Bonan koron? Tute certe,« respondis ŝi ridetante, »sed bonkoranino mi ne estas.« — »Kia domaĝo,« pensis mi, rigardante la elegantan estaĵon.

»Mi estas antikorsetanino«, interrompis la belulino ekregintan silenton. »Ĉu vi estas, sinjoro, por aŭ kontraŭ la korsetoj?« — »Mi, mi,« balbutis mi, nesciante kion respondi. La sinjoro

katon en Beroun, mi ricevis de li la unuajn kvar kajerojn de »La Progreso«. Ho, kiel mi ĝojis, feliĉa, ke mi denove vidas la karajn konatajn nomojn de niaj pacaj kunbatalantoj, legante eĉ de nekonatoj bonegajn artikolojn, vidante, ke la gazeto sincere, malferme diras kaj praktikas sian programon esprimitan de la responda redaktoro en la artikoloj »Sur la nova vojo« kaj »Riproĉoj«.

Estante advokato, mi volas esti ankaŭ advokato de Esperanto. Pro tio min speciale interesis la artikolo de B. Tittl: »Amiki di la linguo internaciona.« Kaj al tiu ĉi bonega artikolo mi deziras fari kelkajn rimarkojn.

Ankaŭ mi studis siatempe Idon, bone sciante, ke, se tiu ĉi lingvo estas pli bona ol Esperanto, tiam certe ĝi estos akceptita kiel helpa lingvo. Se mi konvinkigis, ke Ido estas pli bona, ke ĝi iam estos oficiale akceptita, tiam mi ĝin detale lernus. Sed mi konvinkigis pri la malo, pri la kontraŭo. Mi studis la gramatikon de Ido, mi studis ĝian vortaron kaj legadis ankaŭ idistan periodan gazeton. Mi rimarkis, ke tiu ĉi lingvo kun siaj pli multaj sufiksoj kaj prefiksoj estas unue pli malfacila ol Esperanto.

Due, mi vidis, ke tiu lingvo ne estas ankoraŭ preta, ke eĉ la vortoj unufoje akceptitaj estis refoje de la »ciencosa delegacio« malpermesitaj kaj anstataŭitaj. Oni povis en tiu ĉi gazeto preskaŭ ĉiusemajne legi, ke tiu, aŭ alia vorto mal-

rino ekvidinte miajn embarasojn komencis prezenti la argumentojn kontraŭ la portado de la korsetoj. Tiel mi preskaŭ forgesis, ke mi alveturis por partopreni la kongreson kaj ne por amuziĝi kun belaj sinjorinoj. Subite la grasulo eksopiris: »Kio nur okazis kun la prezidanto? Kial li ne venas?«

»Ankaŭ mi vane serĉis nian prezidanton en la domo de la oficejo kaj neniu konas nek lin, nek la oficejon,« respondis mi al la sinjoro. — »Eĉ mi serĉas jam tutan tagon nian prezidanton sinjoron B., sed mi opinias, ke li nun certe alvenos« diris la sinjorino. — »Sinjoron B.?« elspiris la grasulo, »la saman mi atendas.« — »Sekve li neniam venos«, interrompis mi, »ĉar ĝenerala prezidanto de nia Uldebo estas ankaŭ li.« — »Fripono«, ekkriis la grasulo. »Nur pro li mi trinkas jam preskaŭ unu jaron nur dek glasojn, dume antaŭ mia aniĝo mi trinkadis ĝis dudek. Ho, fripono, kaj krom tio la kotizajoj!«

Malbenante, li forlasis la ĉambron. Mi restis sola kun la bela sinjorino. Mia iluzioj pri la universala bonkoreco iom post iom malaperadis, kaj malrapide mi estis varbita por la universala ligo de antikorsetanoj, kvankam la prezidanto ne venis kaj certe jam ne venos.



aperos kaj estos uzata nova vorto (ekzemple anstataŭ malofita — rara, malgranda — mikra k. t. p. La granda utilo de la prefikso mal — estas tute forigita kaj idistoj sole pro supozata belsoneco estas devigataj lerni tre grandan serion da vortoj, kiujn ni ŝparas dankon al la prefikso mal —.)

Konkludo de mia studado de Ido kaj la komparo kun Esperanto estis, ke Ido estas eksperimenta ludilo de la reformemuloj ĉiam malkontentaj, kiu havas nenian fundamenton, kiu sekve estas ĉiam plibonigebla per vortoj, laŭ la subjektiva opinio de la provizoraj delagacianoj, pli belaj kaj belsonaj.

Kvankam malĝojiga estas la ekzisto de Ido, ĉar ĝi malhelpas la pli rapidan propagandon de la ideo de la helpa lingvo, tamen aliflanke ni povas esti dankemaj al deveno de tiu movado, ĉar ĉiuj reformemaj »lingvistoj«, forlasinte niajn vicajn, povas sin koncentrigi en ĝi kaj valorigi laŭplaĉe siajn reformemajn idealojn, de kiuj ili supozas la savon de la mondo, kaj nia Esperanto estas libera de similaj subfosantaj elementoj. Nia lingvo estos dume parolata kaj praktike uzata en la vivo.

Mi dubas, mi forte dubas, ke la pliboniga celado de idistoj havos iam finon, ĉar la homaj verkoj estas ja ĉiam eraraj. Ido estos plibonigata, dume Esperanto kiel preta neŝanĝebla lingvo estos uzata en la tuta mondo. Esperanto fariĝis jam viva lingvo, kiu havas sian neŝanĝeblan fundamenton kiel naturaj lingvoj en siaj vortrezoroj. Estus ridinde pro sola belsoneco klopodi pri ŝanĝoj tiel same, kiel ĝi estus ridinda kaj neplenumebla en naturaj lingvoj se oni volus nebelsonajn vortojn forigi (ekzemple en la bohema »stré prst skrz krk, en la hungara »alkalmatlankottam« ktp.). Nebelsoneco estas en ĉiuj lingvoj kaj laŭ mia opinio, kiun mi akiris dum la milito pri multaj aliaj lingvoj (pola, hungara, itala), Esperanto ne estas nebelsona, similante la plej belsonan lingvon italan. Stranga, nekutima eĉ nebelsona ŝajnas komence ĉiu lingvo.

Do plibonigu, vi ĉiam malkontentaj reformemuloj vian lingvon Idon. Ni Esperantistoj ne povas vin bezoni. Ni estas kontentaj, ke vi forlasis niajn vicajn ne povante reformi nian fundamenton, kiun ĝenerala Zamenhof, antaŭvidante vian alvenon, donis al ni. Eĉ kiam vi, por akceli vian verkon, uzas la nomon »Esperanto reformita«, vi certe malutilas nian laboron, sed la mondo baldaŭ ekkonos vian »reformon«. Ni dume restos fidelaj batalantoj por nia fundamenta Esperanto.

NE EBLE!

Kelkaj nebohemiaj amikoj sendis al ni artikolojn, en kiuj ili esprimas sian konvinkon, ke la postulo de bohema memstaro estas tute rajtigita kaj ili rekomendas al la bohema nacio trakti pri tiu ĉi punkto kun la Viena registaro, kiu en la lasta tempo prezentis emon interkonsenti kun la bohemiaj postuloj.

La ekscio, ke inter niaj alinaciaj samideanoj vivas sento por justeco, estas por ni tre ĝojiga, sed similajn artikolojn ni ne enpresos, ĉar al simila traktado ni ne povas konsili.

La epoko, dum kiu la bohemiaj kronlandoj apartenas al la aŭstria monarkio, signifas por bohema nacio la veran ĉenon de subpremo kaj turmento, kaj la sennombrajn pekojn de la aŭstria registaro kontraŭ la naciaj justeco kaj egalrajto la Bohemoj neniam forgesos.

Ĉu ankaŭ estas eble forgesi, kiel kondutis tiu registaro kontraŭ la Bohema nacio dum la daŭro de la milito? Forgesi, ke niaj gvidantoj estis ĵetitaj en malliberejojn, ke niaj fratoj mortatis sur ekzekutejoj, ke la bohema spirito estis sufokata per brutalaj ordonoj de la Viena registaro, ke la bohemiaj ĵurnaloj eĉ bohemiaj lernejoj libroj estis konfiskataj? Ni neniam forgesos la minacojn de ankoraŭ pli akra persekutado post la venkobato de la kontraŭuloj!

La tempo de la plej forta subpremo ne povis venki nian esperon je pli bona estonteco. Eĉ en la tempo, kiam en publikaj haloj kaj sur la stratoj ni devis eviti laŭte diri la opinion pri nia situacio, ni ne perdis esperon, ke venos tempo, kiam la demokrata partio de Rajto kaj Justeco sukcesos rompi la brutalan potencon de perforto, piedpremanta ĉiun ideon de humaneco.

Nun, kiam proksimiĝas la epoko de demokracio, kiu al nia nacio alportas memstaron kaj pli feliĉan estontecon, estus vera peko kontraŭ nia konscienco trakti kun tiuj, kiuj por ni havis nur mokadojn, minacojn kaj malliberejojn.

Tial la bohema nacio ne povas trakti kun Viena registaro! Bed. Tittl.

Originale de Běla Rajchlová:

LA ELSOPIRITA FELIĈO.

(Fino.)

Unue ŝin tiu penso timigis kaj surverŝis vangruĝon en la vizaĝo. — »Ho, neniam, mi restos fidela edzino. — Do mi restos sen infanoj? Aŭ denove mi naskos

malgrandan martireton, kiu jam kun signo de perero venos en la mondon? — Ne, ne, pro dio, mi devas havi sanan, belan infanon, por kiu mi povus vivi.«

»Kial mi ne havas sanan edzon, kial ekzemple sinjoro Hladik ne estas mia edzo? Kiajn sanajn infanojn ni certe havus! — — — Li certe ŝin amegas. Ĉiam, kiam ili sin renkontas en la korto aŭ en la koridoro, li tiel fikse rigardas en ŝiajn okulojn! Nur unufoje se ŝi respondus favore lian pasian rigardon, certe — — — Ne! Ĉu mi freneziĝis? Kiel mi poste povus kun li vivi sub la sama tegmento! Ne, mi veturos ien malproksimen, kie min neniu konas, prenos densan vualon kaj vespere iros eksteren, kaj kiam mi renkontos iun fortan sanan viron, mi diros al li, ke li iru kun mi — — — Dio bona, tio estas tertura — — — Terura? Kial? Tiu viro min neniam ekvidus kaj neniu ekscius tion, kaj mi havus belan kaj sanan infanon, kiu etendus al mi siajn manetojn kiel la knabeto de nia alservantino — — —«

Havante la kapon plena da similaj ideoj, ruĝa pro ekscito, ŝi eliris iam sur la korton. Proksimiĝis sesa horo, la tempo, kiam Jardo revenadas el la ofico. Ekaŭdinte liajn paŝojn ŝi viŝis per tuko sian flamantan vizaĝon kaj iris al li renkonten. Sed kiu alvenis ne estis Jardo, sed la juna oficisto Hladik, iranta hejmen. Ŝi ekhaltis antaŭ li kaj iliaj okuloj sin renkontis. En la momento traflugis ŝian kapon ĉio, kion ŝi en la lasta tempo pensis kaj ŝi forte ruĝiĝis. En liaj okuloj montriĝis miro, li ne povis kompreni la kaŭzon de tiu flamanta rigardo. Li salutis, profunde forprenante la ĉapelon, kaj Manjo ekreginte sin diris: »Pardonu, mi pensis, ke mia edzo venas« — kaj ne atendinte respondon, ŝi rapide revenis hejmen. La koro forte batis en ŝia brusto kaj la piedoj tremis tiom, ke ŝi devis sidiĝi.

Post ne longe venis Jarda. Ŝi aŭdis lian tusadon jam de malproksime kaj ŝia koro estis premita pro doloro. Li malfermis la pordon kaj en duonlumo serĉis Manjon, kiu sidis en angulo de la sofo, havante la vizaĝon kovrita per la manoj. »Kio al vi okazis Manjo, ĉu vi denove ploras? Estu jam saĝa« — li diris kviete, sidiĝante al ŝi. Ŝi formetis la manojn de la vizaĝo, rigardinte en liajn grandajn okulojn, en kiuj sin trovis tiom da amo, ŝi alpremis

sin al li kaj ekploris. — Kiel ĉasta estis Jardo kompare kun ŝi, kiel ĉasta kaj bona!

»Vi estas malsana, kara Manjo, vi bezonas forveturi ien. Tie ĉi vi neniam forgesos kaj certe vi malsaniĝos« — li diris. Ho, kial ŝi tiam neobeis, kial ŝi ne forveturis! Bedaŭrinde ŝi restadis sola kun siaj pensoj, kiuj ŝin ensorcis.

La sekvantan tagon post la renkonto kun la juna oficisto Manjo eĉ ne volis eliri en la korton. Sed vespere, kiam ŝi volis fermi la fenestron turnitan en la korton, ŝi trovis sur ĝi ruĝan rozon. Kion fari kun ĝi? Ĉu ŝi tion diru al Jardo? — Ŝi diris menion kaj kaŝis ĝin en komodon inter la tolaĵon.

La sekvintan semajnon je konsilo de sia amiko kuracisto forveturis Jardo en sanatorion de Benešov. Manjo lin akompanis kaj post tri tagoj ŝi revenis hejmen. Tuj vespere aperis en la malfermita fenestro la kapo de la juna oficisto tenanta tri rozojn. — »Tre estimata, permesu al mi eniri, mi tre deziras paroli kun vi,« mallaŭte li diris kaj vidante, ke Manjo estas en embaraso kion respondi, li rapide eniris. Apenaŭ li transpaŝis la sojlon, li tuj varmege ekparolis pri sia granda amo. Ho, kiel li ŝin amegas, li pensas tage eĉ nokte nur pri ŝi, kaj tamen ŝi estas ĉiam tiel fiera. Fine, ĝis hodiaŭ li estas tiel feliĉa, ke li povas rigardi en ŝiajn okulojn kaj kisi la karegajn manetojn — — —.

Manjo estis kvazaŭ ebria — — — — —

Kiam post unu monato Jardo skribis, ke li revenos, ŝi veturis al li renkonten al Praha. Kaj tiam komencis ŝia turmentado. Kiam alprenis ŝin Jardo al sia brusto kaj rakontis kiel multe li sopiris je ŝi, kaj ŝi tamen tre malmulte skribis al li, — ho, tiam ŝi jam volis konfesi ĉion.

Kiam ili revenis hejmen, ŝi skribis al Hladik, ke li forlasu ĉi tiun domon, alie ke ŝi rakontos ĉion al sia edzo. Li tuj respondis, petegante, ke ŝi lin ne forpelu, ke li ne povas vivi sen ŝi, sed Manjo resendis lian leteron sen rimarko.

Kaj nun ŝi atendis infanon, lian infanon, la elsopiritan sanan kaj belan infanon, kiu devas al ŝi alporti feliĉon kaj kontentecon. Ho, kie restis ŝia revado! La grandaj, puraj okuloj de Jardo forpelis de ŝi trankvilon, prenis al ŝi ĝojon kaj feliĉon. Ŝi travivis en sia gravedeco terurajn momentojn, en kiuj ŝi estis proksima de fre-

neziĝo. Kiam la kuracisto al ŝi konfidis, ke Jardo ne ĝisatendos la printempon, ŝi iom trankviliĝis kaj atendadis lian finon — — —. Kiel ŝi sopiris, ke liaj okuloj sin fermu pli frue, ol la infano venos — — —.

Kaj hodiaŭ estis vane sin defendi. La patrino alveturis tuj kaj matene ricevis Manjo belan filineton, sed post du horoj, spite la helpo de lerta kuracisto ŝi mortis pro elsango. Jardo premis ŝin kaj aŭskultis ŝiajn mallaŭtajn vortojn, el kiuj li komprenis nur »pardonu Jardo«.

Kion li devas pardoni al la karega, bona Manjo, kiun li ĉiam senfine amis — ?

Post ne longa tempo li sekvis sian amegatan Marinjon. La infaneton, la elsopiritan feliĉon de sia malfeliĉa, ankaŭ elsopiritita filino forveturigis kun si la avino...

Ant. Janalíkova

MIA MALLIBERIGO

en la jaro 1915.

(Daŭrigo.)

Dimanĉe oni ne laboris, dum labortagoj oni surfadenigis malgrandajn platajn pinglojn kaj kunligadis ilin po 50 aŭ 100 pecoj. Legi estis ankaŭ permesite. Krom la libroj, kiuj estis en ŝranko provizis min la inspektistino per kelkaj germanaj libroj.

Tiamaniere mi vivis dum tuta aprilo kaj majo. Nur kelkaj sunradioj, kiuj penetris en nian ĉelon sciigis min pri la printempo. Kelkaj siringaj arbustoj sur la korto montris al mi sufiĉe rapidan vekigon de la naturo. Ĝiutage dum unu duonhoron mi povis ilin observi. La malgrandaj burĝonoj disvolviĝis — malaperis, kaj mi estas ankoraŭ malliberigita. Ĝiutage estas eble duonhoron spiri freŝan aeron, se estas eble nomi freŝa la aeron de tiu kvartalo en kiu sin trovas multaj fabrikejoj kaj preskaŭ ĉiusemajne dum nia promenado oni bruligas insektojn en iu aparato troviĝanta meze de la korto el vestaĵo de diversaj gekondamnitoj. Per abomena fumo estas pleniĝita la tuta korto, ĝi penetras en ĉelon kaj turmentas nin tutan tagon.

Sur blua kvadrato de ĉielo limigita per tegmentoj pasas hirundo. Kuraĝaj paseroj venis ĉiutage manĝi panerojn, kiujn mi ĵetadis al ili. Ili saltas ĝoje kaj pepas, kvazaŭ ili volus ĝojigi la mizerajn kondamnitojn. Kaj nigra merlo sidanta sur kontraŭa tegmento, fajfis sian amkonfeson al sia kunulino — — — — —.

Tio estis mia printempo.

III.

Eble estus interese konatiĝi iomete kun virinoj, kun kiuj mia sorto per strangaj cirkostancoj kunliĝis. Komence preskaŭ neniu el ili sciis, kial oni aretis ŝin; ĉiu estas tute senkulpa. Iom post iom ili fariĝis konfidenciaj, ĉiu rakontis al mi sian aferon kaj petis konsilon.

65 jara maljunulino M. estis jam 2 monatojn en aresto, kiam mi venis kaj ŝi ne scias ankoraŭ, kiel ĉio finiĝos. Ŝia propra filo denunciis ŝin, ke ŝi ion diris pri nia imperiestro. Li faris tion el iniciativo de sia edzino, kiu venĝas pro tio, ke avino donacas ion ankaŭ al sia filino en Vieno kaj ne ĉion al ili.

Li forpelis ŝin ankaŭ kun bastoneg). »Miaj oraj knabinoj, tio estis terurega, kiam oni kaptis min. Mi pensis, ke oni metos min sub la teron kaj poste ke oni mortigos min sen esplorado,« tia maniere ŝi rakontis, veninte inter aliajn. Ŝi havis poste advokaton, al kiu ŝi pagis 100 krcnojn el mono, kiun ŝi havis ŝparitan per enterigo. Sed la advokato ne povis helpi, ĉar la atestanto ĵuris kaj la bona maljunulino ricevis 12 monatojn. Tiam ŝi revenis tute malfeliĉa. Ŝi devis demeti sian belan ruĝan jupon, surmeti arestan vestaĵon kaj oni metis ŝin en alian ĉambron. Ne estis jam permesite paroli kun ŝi. Nur ŝiaj malĝojaj okuloj ĉiam silente rigardis min, se ni dimanĉe dum promenado kurvenis.

El la sama krimo estis nur por 6 monatoj kondamnita mastrino M. koncerne tion, ĉar ŝia edzo en milito perdis vilsenton. (Daŭrigo.)

KRONIKO.

Praha. Nia fervora propagandistino fino. Julie Šupichová gvidas jam 6. jaron esper. rubrikon en junulara gazeto »Malý Čtenář«. En la nova jarkolekto, laŭ deziro de la redakcio, ŝi komencas enpresi kurson por komecantoj — infanoj, rimarkinde estas, ke fino. Šupichová estas ankaŭ en skriba rilato kun la infanoj, kiuj el ŝia rubriko lernas esperanton.

Plzeň. Esperantista Klubo translokiĝis en kafejon de »Měšťanská beseda«, kie ĝi aranĝas ĉiusabate ŝtajn oficialajn kunvenojn. Ĝis la elekto de nova prezidanto gvidas la klubajn aferojn so. vicprezidanto Fr. Fikrl, ĉefrevidento de ŝtataj fervojoj.

Laborista societo turista en Plzeň, la konata societo, kiu en ĉiujaraj esp. kursoj gvidataj de so. Pech propagandas esperanton inter la laboristaro, festos la 13. oktobron je le 8. horo vesp. en prelega halo de laborista domo »Peklo« sian kvinjaran ekziston. Sur la programo estas interalie du paroladoj kun lumbildoj: IV. aŭstria esper. kongreso en Franzensbad (de so.

Pech). Pri skatitismo inter la laboristaro (de so. Beneš).

Pardubice. La 19. sept. vizitas la kluban kunvenon so. ing. Berger kun sia edzino (el Moravany) kaj en interesa esperanta parolado li prezentis siajn travivaĵojn en du unuaj militaroj en Serbujo.

Jilemnice. La 30. de septembro faris tie ĉi so. Miloš Lukáš paroladon pri Esperanto por la lokaj gestudentoj. Multaj el ili mendis jam esp. lernolibrojn kaj komencis lerni.

Przemysł. La solaj tie ĉi vivantaj esperantistoj, leŭtenanto Aŭg. Pitlík el Praha kaj studento Tadeusz Pacula, kunvenas ĉiujaŭde, penanta diskonigi nian aferon en la por Esperanto ĝis nun preskaŭ fermita regiono. La kunvenoj fariĝu semo de la venonta esp. movado en Przemysł! — La traveturantajn esperantistojn volonte informas: Leŭt. Aŭg. Pitlík, Schützenreg. No. 18. Przemysł.

Wien. La aŭstria Katolika Ligo Esp. eldonis prese sian raporton el kiu ni konvinkiĝas pri la vere senlaca laboro de la nomita ligo. — La 1. de oktobro okazis esperanta diservo en Wien VII., Kaiserstr. Post la diservo kunvenis la partoprenintoj en pedagogio Kenyong. S., kie estis malfermita nova kunveno de A. K. L. E.

BIBLIOGRAFIO.

Hungara Esperantisto estas la nomo de la nova gazeto, kiun komencis eldoni niaj hungaraj amikoj. Ĝi aperas en amplekso de 12 paĝoj 16×24 cm. monate en Szeged, Szentháromság utza 30, sub la redakcio de Petro Turzó. Jara abono 8 K. La enhavo de tiu ĉi gazeto estas en pli granda parto skribita en hungara lingvo. El la esperantaj artikoloj ni povas juĝi, ke la gazeto estas zorge redaktita kaj tial la devo de ĉiu hungara samideano estas ĝin aboni kaj ĉiuforte subteni.

Kleine Esperanto-Sprachlehre. Sub tiu ĉi titolo aperis en la kolekto »Zweispachige Bücher« (Dulingva biblioteko) eldonata de la firmo Adler & Borel en Dresden A. Struvestr. 40. germanlingva lernolibro de Esperanto, skribita de instruisto Herm. Böbs. Ĝi estas broŝurita, 64paga, 11×15 cm. kaj kostas 0. 250 Sm. — Jam post la ekvido oni povas diri, ke en ĝi aperis ne nur tre taŭga propagandilo, sed eĉ bona helpilo por ĉiu, kiu volas konatiĝi kun Esperanto. La enhavo de tiu ĉi libreto estas riĉa, zorge elektita kaj oni ĝin povas rekomendi precipe al la aranĝantoj de esp. kursoj por Germanoj.

J. Šupichová:

ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

3a fragmento.

El parolado de Dro. L. L. Zamenhof en la IIIa kongreso en Cambridge 1907:

»Nun nia afero staras forte. La glacia tavolo da antaŭjuĝoj de la mondo estas rompita, kaj nia afero kreskas regule kaj senhalte. Ĉiu jaro potence pligrandigas niajn fortojn, kaj ni iras

al nia celo jam kun plena trankvileco. Centoj da miloj da radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam ne timas la venton. La naturo, kiu longan tempon batalis kontraŭ ni, batalas nun per ni, ĉar tiu sama forto de inercio, kiu longan tempon terure malhelpis ĉiun nian paŝon, ĝi mem nun ŝovas nin antaŭen. Eĉ se ni volus nun halti, ni jam ne povus...

Rozbor. — Analizo.

Afero = věc. — Komerca afero = obchodní věc. — Juĝa afero = soudní věc. — Stari = státi. — Starigi = postavi. — Kontraŭstari = odporovati. — Memstara = samostatný. — Superstari = přečnivati. — Forta = silný. — Forta brako = silná paže. — Fortigi = posiliti. — Perforto = násilí. — Glacio = led. — Glaciaĵo = Zmrzlina. — Tavolo = vrstva. — Antaŭjuĝo = předsudek. — Rompi = zlomiti. — Interrompi = přelomiti, přerhnouti, přerušiti. — Kreski = růsti. Kreskaĵo = rostlina. — Altkreska = vysokorostlý. — Regulo = pravidlo. — Regularo = stanovy. — Reguleco = pravidelnost. — Halti = zastaviti se. — Senhalte = bez ustání. — Potenca = mocný. — Celo = cíl. — Sencela = bezúcelný. — Plena = plný. — Plenaĝa = plnoletý. — Plenmano = hrst. — Trankvila = klidný. — Radiko = kořen. — Teni = držeti. — Deteni = zdražovati. — Subteni = podporovati. — Timo = strach. — Timigilo = strašák. — Vento = vítr. — Aerumadi = větrati. — Naturo = příroda. — Homa naturo = lidská přirozenost, povaha. — Tempo = čas. — Libertempo = prázdniny. — Batali = bojovati. — Batalhalto = příměří. — Inercio = línkvost. — Paŝo = krok. — Ŝovi = posouvati, postřkovati.

Traduko.

Mia naskiĝloko. Mia naskiĝloko estas vilaĝeto kun kvindek dometoj, kun lernejo, kun preĝejo kaj kastelo. Nia dometo staras apud la ŝoseo. Sub la teretaĝo estas kelo. Post la dometo estas korto kaj ĝardeno. Kontraŭ ni troviĝas malnova kastelo. De ĝia alta turo

estas bela perspektivo. Apud la kastelo estas krom belaj parkoj ankaŭ grandaj herbejoj. Trans la herbejoj gvidas irvoĵeto en la arbaron. Inter la herbejoj fluas rivereto. Laŭlonge de la rivereto kreskas altaj salikoj. Bele estas ĉe ni!

Přeložte:

Zima. V zimě příroda odpočívá a země nabývá nových sil pro jaro. Stromy jsou holé, jen jedle, smrky a borovice podržely svůj zelený šat. Zpěvaví ptáci nás opustili, neboť nedostává se jim potravy. Lidé dovedou se uchránití zimy, ale mnohým zvířatům je zle. Brusliči prohánějí se po ledě a děti si staví sněhuláky. Zima rozpaluje jejich líce, přece však jsou raději venku nežli ve světnici.

Poznámka: Majíc na mysli, že tento »koutek« je věnován pouze za čátečníkům, volím zúmyslně nejprve takoveto jednoduché, zdánlivě snadné články. Domnívám se totiž, že jest rozhodně lepší, když začátečník správně, aneb dosti správně přeloží několik frází jemu jasných, než kdyby pracně sestavoval duchaplný článek a porovnával jej potom s uveřejněným překladem, seznal, že jeho znalosti jazyka esperantského mu naprosto nestačí! Raději tedy málo, ale dobře!

KVITANCO.

(Daŭrigo). La aperadon de La Progreso ebligis jenaj soj.: Gaŭba Jos., Skuhrovec Jos., Vavírka Jan, Kovářík Ant., Karas V., Jeniček Al. po 10 K (Ĉiuj estas membroj de Lab. soc. turista en Plzeň), Ĉemus Lad. 20 K, Stratil Ad. 10 K (Lab. turistoj el Vídeň), Friedler Ant., Zvorník en Bosnio 10 K, Esper. kurso en Škvrňany 21 K (Kolektis so. P. Kepl). Nový R., Šrámek, Kladno, Koutek Konst., Praha, Podlipiský Jos., Smíchov, Batěk Em., Říčany, Müller K., Drahanovice, Pitlik Aug., Przemysl, Lukáš Mil., Kampa pošto 411., ĉiuj po 10 K, prof. Friedrich Rud., Nagyilva 20 K. Korekto: En la 4. no ni erare kvitis al Fino Jul. Šupichová 20 K, ĝuste estas: Šupichová J. K 10, Dlouhých Sid. 10 K. (Daŭrigo).

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

(inĝ. L. Berger.)

Moravany apud Pardubice,
Bohemujo.

Ĝi peras korespondadon, informas pri esp. movado, pri bohema nacio, prizorgas kaj korektas tradukojn, aranĝas paroladojn, kursojn, instruas persone eĉ skribe, vendas esperantajn librojn, glumarkojn, signojn, Mateon.

MATEO,

alie nomata paragvaja teo estas la sola efektive valora anstataŭaĵo por kafo kaj ĥina teo. Ĝi enhavas 1% da kafeino, efikas refreŝige eĉ kurace. Pura naturaĵo antaŭ la milito rekte importata el Ameriko pere de Esperanto.

Tre taŭga por ĉiutaga trinkado.

Paketojn po 3.— K poŝte ĉien ekspedas kaj pli detalajn klarigojn donas

BOHEMA ESPERANTO-SERVO

(inĝ. L. Berger)

Moravany-Bohemujo.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.